

KATOLIKA SENTO

Jaro 55^a - 1976



4

KATOLIKA SENTO

n° 4

55a Jaro

Aprilo 1976



Okaze de la Sankta Pasko
U.E.C.I. kaj Katolika Sento
preĝpetas abundajn gracojn kaj benojn
de la venkinto de la morto
Jesuo
sur ĉiujn Katolikajn Esperantistojn
kaj ĉiujn niajn legantojn

UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI ITALIANI
(U.E.C.I.)

47037 Rimini (FO) - Vc. S. Bernardino, 26 -
tel. (0541) 25931

Nei giorni 1 e 2 maggio p.v. si svolgerà a Rimini il
convegno del' U.E.C.I.

TEMA DEL CONVEGNO: "Il problema linguistico
nell'opera di evangelizzazione e promozione umana".

Possono partecipare al convegno anche gli esperantisti non soci, escluso il diritto di voto e alla candidatura per il rinnovo del Comitato Centrale.

Programma di massima: Venerdì, 30 aprile, pomeriggio e sera: arrivi, sistemazione in albergo, cena, tempo libero. Riunione del Comitato Centrale uscente. Sabato, 1 maggio, mattino: ore 9 Messa in Espe -

ranto nella cripta della Chiesa S. Girolamo a Marina
Centro; ore 10: apertura e relazione sul tema del con
vegno (Hotel Baltimora); pomeriggio e sera: tempo li
bero, eventuale escursione a S. Marino o altrove.

Domenica, 2 maggio, mattino: ore 9 Messa in Espe -
ranto come sopra; ore 10: Assemblea Generale, pro-
seguimento dei lavori e chiusura del convegno; pome-
riggio e sera: partenze, tempo libero.

Note: 1)- Quota di iscrizione al convegno £.2000, pre
notazione albergo £. 3.000. Si potrà usare il ccp
8/13042 "Cer-centro esperantista riminese" Vc.S.
Bernardino, 26;47037 Rimini.

2)- Pensione completa (tre pasti e pernottamen-
to) £. 6.000. (Seimila) c/o Hotel BALTIMORA (sede
del convegno), Viale Trieste, 22 - Tel.(0451)28522
Per camera singola si richiede un supplemento di
£. 1.000 (mille). Dalla stazione ferroviaria BUS nn.
10 e 11, fermata n. 10.

3)- Per chi volesse prenotare il solo alloggio in camera a 2 o più letti (pensione "MANOLITA", vicino al Baltimora) £ . 2.000.

4)- Si prega di prenotarsi al più presto indirizzando tutto alla Segreteria del convegno: Vc. S. Bernardino, 26 - 47037 RIMINI.

[illegible]

ABONIS K.S.-on 1976 (5a listo):

Francujo: R. Lecocq; Germanujo: B. Rejnic; Hispanujo: J. Bielsa; F. De la Puente; Hungarujo: A. Csepella; L. Kòbor; S. Szenasi; Italujo: Florenco: P. Bro -

velli; Massa: C.Dazzini; Milano: C.Valvassori; C.C. Ferrari; Prato: B.Longoni; Romo: R.Corsetti; U.Cerqua; Treviso: E.Martina; Udine: P.Trevisani: E.G. "Espero Friuli"; Vivo(SI): O.Dinetti; Jugoslavio: A. Mlakar; Nederlando: U.E.A.; J.Fischer; Pollando: R.Forycki; D.Zapolska; E.Wasilewski, L.Kosieniak; A.Ziolek, H.Gorecka; B.Sobol; S.Widera; K.Martynski; E.Edling; Usono: L.Schmidt.
Entute: 324.

.....

LIBROSERVO

Kristana Esp-ista Jarlibro	£ . 1.000
Muzilo - 4	1.500
La Sklavoj de Dio(anstataŭ 3.000)	1.500
Ekumenismo k.Internacil:probl.	1.800

Bildkartoj: Patro Nia; Prikantegas; Memoriloj pri antikva Romo (serio da 6 bk-oj); S.Pio X; Salve Reĝino. Ĉiu 15 lirojn.

Bildetoj pri N.S. de la Espero:	10
Aboŭo al Katolika Sento	2.000
Insignoj	150

.....

SERIO DA POŝTMARKOJ por memorigi la 4an jarcenton de la morto de Tiziano Vecellio, itala pentristo: 1576-1976, estos eldonita en "Città del Vaticano" je la 13a de majo 1976.

La serio enhavos du nominalojn, je 100 kaj 300 liroj, respektive sur la reprezentado de du detaloj de la "Madono en gloro kun la Infano kaj ses sanktuloj", pentraĵo gardata en la Vatikanaj Muzeoj.

LA VATIKANA RADIO dissendis cirkuleron al ĉiuj ad resintoj al ĝi, kiel respondon al ilia peto. Al kelkaj el ĉi tiuj ĝi aldonis ankaŭ apartan respondon. La cirkulero anoncas:

"Kara Aŭskultanto,

La Sanktan Sabaton, 17-an de aprilo, je la 23,30 h. G.M.T., unuafoje surondiĝos, per la Vatikana Radio, dissendo en Esperanto, laŭ semajna ofteco.

Ĉi tio responde al la varma deziro de multaj el la katolikaj Esperantistoj, kiuj, dum nia tempo, en kiu amaskomunikiloj estas je la servo de malbono kaj malvero, insiste petas, ke pli kaj pli la vorto de Kristo kaj de la Eklezio, ankaŭ per Esperanto, riparu, kompensu, prilumu.

Fakte ili, konsciaj ke la idealo de Esperanto - interfrateco de popoloj - estas esence kristana, ekde la naskiĝo de la Internacia Lingvo klopodis, por ke ĝi servu al la disvastigo de la vorto de Dio kaj al la instruoj de la Eklezio.

La dissendoj de la Vatikana Radio en Esperanto povos, komence, ŝajni tro malgranda paŝo, sed ili estu esprimo de nia aprezado kaj kuraĝigo, kvankam laŭ la limigitaj rimedoj pri kiuj ni disponas, kompare kun la vasteco de la evangeliza problemo.

La horo de niaj esperantaj programoj estis elektita ne senintence malfrua, por ebligi la plej efikan disvastigon ĉiudirekten per mezlonga ondo (1529 kHz) en la tuta Eŭropo kaj en la Mediteranea zono.

Ni nun petas de vi, ke vi bonvolu informi nin, ĉu vi povis bone aŭskulti, kaj ke vi esprimu konfide al ni viajn dezirojn kaj sugestojn, kiuj estas valora helpo al nia laboro.

La Itala Sekcio, kiu kunlaboras kun la Vatikana Radio en la Esperanta kampo salutas elkore vin, atendan

te viajn respondojn".

Ĝis nun la ĉirkulero, kiun ni deziras diskonigi ankaŭ inter tiuj, kiuj ne skribis al la Vatikana Radio, por akcenti, ke ĝuste la amaso da leteroj, kiuj alvenis al la Vatikana Radio, renversis la antaŭajn malhelpojn, kiuj montriĝis "teknika neebleco" de tiu dissendo.

Sekve de tio ni rekomendas, ke ĉiuj petu de la: Radio Vatikana - Città del Vaticano - la senpagan "Bollettino Programmi" kaj ke oni skribu ofte al la sama Vatikana Radio por montri la viglan intereson estigitan de tiu dissendo.

• • • • •

POR ENKONDUKI la preparojn al la IKUE-kongreso de la venonta jaro 1977, P.H. Paruzel sendas al ni ĉi tiun unuan artikolon. Kvankam ni jam parolis pri ĉi tiu temo en la 3a n° de K.S., ĉi tiu priskribo de la plej agema katolika esperantisto en Pollando estos tre grava kaj ŝatata de niaj legantoj.

LA HELA MONDO DE ĈENSTOĤOVA INVITAS !

Ĝi estas famkonata, kiel pilgrimcentro, kara por ĉiu pola koro , la Sanktejo de la Nigra Madono, alloganta la katolikan mondon, kiel Lourdes, Fatima ...

La bildon de la Nigra Dipatrino donacis al Patroj Paŭlanoj, venigitaj el Hungarujo en 1382, pola princo, Ladislao, nomata "Opolano". La origino de la pentraĵo, kaj ĝia praa historio estas ne certaj. Oni indikas la VI-an jarcenton kaj klasifikas ĝin inter la "hodogetriaj" bildoj, imitantaj la Jerusaleman Dipatrinon kun Jesuo-Infaneto surmane, honoratan en oriento. Tial la

tradicio ligas la devenon de la bildo kun la pentrista arto de S-ta Luko, Evangelisto. La Madono posedas helbronzan koloron, kiu nomigas Ŝin "Nigra". Je la maldekstra vizaĝflanko pendas ondanta hararo, kaŝiĝanta sub la mantelo. Kaj la okuloj, plenaj je bono kaj patrina zorgemo, rigardas direkte la spektanton. Sur la dekstra vango videblas du gravaj fendetoj, oblikve tranĉitaj, kvazaŭ glavospuroj. Tiuj cikatroj rememorigas pri rabista agreso kaj profanado de la bildo en 1430.

Sendube la Dipatrina Bildo sur la Hela Monto estas portreto misteroplena, inspirita de profunda kulto kaj honoro al la Plej Sankta Virgulino vartanta la Jesu-Bebon, aperanta al ni en supernatura majesto, plenumanta sian reĝinan rolon, kiel Patrino de la Savanto.

Jesuo sur Ŝiaj manoj montriĝas kiel enkarniĝinta Saĝeco, tenanta en gesto persona kaj decida la Evangelion. Maria mangestas al Kristo, kvazaŭ Ŝi rememorigus sian rekomendon: "Kion ajn Li diros al Vi, faru ĝin". (Joh. 2:5). Tiujn vortojn bone komprenas la sennombraj pilgrimuloj alvenantaj ekde jarcentoj sur la Helan Monton. Atestastion amasiĝintaj votoj kaj la oraj kronoj ornamantaj la kapojn de Jesuo kaj Maria. La tuta Hela Monto kun la kapelaro kaj la superba arkitektura ensemble estas unu granda dankvotaĵo de l' amo, sindono kaj omaĝo al la Patri-no de Dio kaj homoj. La Monto estas antaŭ ĉio centro sanktigita pro speciala Dia ĉeesto pere de la bildsigno de la Jesu-Patrino. Samtempe ĝi estas viva atesto pri la religia vivo de la Pola Nacio, atesto pri ĝia profunda enradikiĝo en ties kristanan kulturon.

La titolo difinanta Marian per la nomo Reĝino de Po

lujo, kies spirita metropolo fariĝis la Hela Monto, eliĝis el la religia konscio de poloj surbaze de simplaj historiaj kondiĉoj. Post la venkoplana defendo de la Klostro dum la t.n. "sveda diluvo" .. la reĝo Johano Kazimiro proklamis Marian: Patrino kaj Reĝino de Polando. En 1764 la kunvokita Pola Sejmo per speciala konstitucio deklaras, ke la popolo spertas en bezonoj protekton de sia Plej Sankta Patrino kaj Reĝino en la Ĉenstoĥova Bildo.

Kiam Polujo perdis la sendependecon kaj estis forstrekita de la eŭropa mapo, dum longa, post la landdispartigo, mallibereco, sole la Helmonta Reĝino kun sia Centro estis videbla signo pri la vivo kaj unueco de la tiranregata, far la okupantoj, nacio, eĉ rekona signo de samlandanoj dispelitaj en la tutan mondon.

La Helan Monton pilgrimis kun poloj aliaj popoloj el ĉiuj flankoj de la respubliko, de la najbaraj landoj serĉante religian konsolon kaj kuraĝigon por la tuta vivo. Ankaŭ la rolon, unuigi la suferantan kaj luktantan por sia ekzisto Polan Nacion, plenumas patrinece la Helmonta Reĝino. Dum la lasta hitlerana okupacio, kiam ĉiam lumoj de l'espero estingiĝis, restis nur la Nigra Madono kaj Ŝia Eklezio.

Kun tiu Monto estas ligitaj multaj tutpollandaj animzorgaj iniciativoj, inter kiuj elstaras la sindediĉo de la Pola Nacio al la Senmakula Koro de Maria (1946), la Helmontaj naciaj votoj (1956). Ĉi tie komenciĝis la nova jara Granda Tagnaŭo antaŭ la miljara datreveno pri la Bapto de Polujo (1966), la Festojaro antaŭ la 300-jara datreveno pri la Venka Defendo. Ĉi tie komenciĝis la vizitado de la Mirakla Bildo tra polaj diocezoj kaj paroĥoj. Oni iniciatis ĉi tie porkonciliajn preĝadojn, la gravajn sesiojn de la Pola Episkoparo k.t.p.

Ĉiujare alvenas al la Sanktejo preskaŭ du milionoj da fideluloj, turistoj landaj kaj eksterlandaj, inter kiuj, sub la verda standardo, tiuj, por kiuj kara estas la ekumena "Preĝo" de nia Majstro.

Ni rememorigas. niajn gelegantojn, ke la unua IKUE-pilgrimo okazis en la Zamenhofa Jaro (1959) dum la U. Kongreso en Varsovio.

Ĉi-jare havas lokon sur la Hela Monto tutpollanda ekumena preĝtago, nome: meminciata esperantista kunveno, kiu komenciĝos per preĝado de la 5/6 junio 76 kaj finiĝos posttagmeze la 6-an. Tiun dimanĉon ariĝos ĉiuj verdstelanoj antaŭ la Nigra Madono, kiun "ĉiuj generacioj nomos benata" (Luk. 1:48). Jes, la pilgrimo estos certe "preludo" de la venontjara IKUE-Pilgrimo (Kongreso), kiu okazos de la 18a ĝis 23a VIII 1977, en kiu partoprenos multaj diverslandanoj por omaĝi la Dipatrinon, kiu reĝinas al la Pola Nacio jam sescent jarojn sur la Hela Monto. La sescentjara datreveno estos solene festata en 1982.

La internaciaj pilgrimontoj spertos la veron pri la escepta rolo de la Helmonta Sinjorino en Polujo, kie Ŝi ne nur stimulas al preĝo kaj akcepto de la Sanktaj Sakramentoj, sed helpas la vizitantojn trovi la plenan sencon de la vivo kaj la rektan vojon al Dio. Ĝin atestas ankaŭ konvertiĝoj, vivoŝanĝoj al kristana sinteno, decidoj al la sacerdoteco kaj monaĥa vivo.

Por tiu IKUE-Pilgrimo-Kongreso en 1977 aliĝojn akceptas nia Centro en Romo, via Berni 9. Ĉiu sinanoncinto ricevas aliĝilon kaj adreson de samideano en Polujo, kiu garantios la gastigon en la pilgrimurbo. Krom tio, en ĉiuj respektivaj landoj, Pola Ambasado donas informojn kiel pagi la 5-6 tagan restadon en Polujo.

Ni invitas al Ĉenstoĥova en 1977 (18-23 VIII). Kaj en la kuranta jaro 1976, venu la 5-6an en junio !!!

Henriko PARUZEL

El la Katolika Eklezio

Plaĉos certe al niaj samkredanoj la priskribo de ĉi-tiuj mirakloj okazintaj diversloke en Eŭropo, sed kies rakonto estis diskonigita per la usona periodaĵo "The Enquirer". Kvankam nia kredo tute ne bezonas pri tiuj pruvoj, ĉar ĝi havas fundamenton sur la vorto de Dio, tamen estas motivo de ĝojo, kiam oni konstatas ilin.

Ni dankas s-on S. Docal, kiu tradukis por ni tiujn raportojn.

- I -

"Vizio de Jesuo resanigas viron paralizitan dum 25 jaroj.

"Mi vidis Jesuon kaj mi resaniĝis!" diras 67-jara ita la vilaĝano, kiu estis paralizita kaj muta dum 25 jaroj pro tumoro en la cerbo.

"Nun," diras lia kuracisto, "mi aŭdis lin paroli kaj vidis lin marŝi: mi ne povas ekspliki tion science".

Liberato Buonsanto, kiu loĝas en Calabritto, ĉirkaŭ 50 mejlojn oriente de Napolo, ne estis povinta piediri, nek paroli nek movi membrojn ekde 1950.

La eksterordinara evento okazis je la 26a de decembro pasintjare. Nevicella, la edzino de Liberato, enlitiĝis kiel kutime apud sia paralizita edzo, ne suspektante, ke iliaj vivoj estis ŝanĝontaj tiun nokton.

"Subite mi sentis skuon en la lito" ŝi rakontis al la raportisto de The Enquirer, en sia hejmo. "Mi ŝaltis lumon, kaj vidis Liberaton rekte sidanta en la lito. Mi konfuziĝis pro la surprizo. Li ne estis movinta sin dum 25 jaroj. Sed mi miris eĉ pli, kiam li turniĝis al mi kaj ekparolis! Li diris: "Jesuo resanigis min. Mi deziras marŝi". Mi ellitiĝis por helpi lin. Li metis manon sur

mian ŝultron kaj malrapide stariĝis. Kia surprizo vidi lin fari unu paŝon post la alia! Tiam, ni ambaŭ surge nuiĝis preĝante".

Sidante en seĝo apud sia edzino, Liberato, kun dikaj okulvitroj kaj krucifikso pendanta el ĉeno ĉirkaŭ la kolo, klarigas tion, kio okazis: "En mia dormo mi havis vizion" li diris parolante malrapide sed klare. "Mi estis en ĝardeno plena de floroj kaj suno, kiam du homoj venis al mi. Unu estis mia patrino, kiu mortis en 1913. Kun ŝi estis juna viro, kiu diris: "Mi estas Jesuo. Venu kun ni".

Ili prenis po unu el miaj manoj kaj kondukis min al arbo, kie la Dekdu Apostoloj sidis en cirklo. La Patrino de Jesuo ankaŭ estis tie. Jesuo ordonis min kuŝi en la centro de la cirklo, kaj kiam mi faris tion, li tuŝis min malantaŭ la dekstra orelo. Mi sentis tikladon tra mi, kaj mi vekiĝis. Kiam mi vekiĝis, mia korpo ankoraŭ ĵukis. Tiam, dank' al Jesuo, mi ekmarŝis".

La kuracisto de la familio, D-ro Giuseppe di Trolio, diris: "Mi konas Liberaton jam de 11 jaroj. Li neniam parolis kaj faris simplan paŝon ĝis kiam li havis la vizion".

D-ro Ciro Ruocco, la kuracisto de la vilaĝo de 1958 ĝis 1964, diris al la raportisto de The Enquirer: "En 1950 specialistoj de Napolo diagnozis, ke li havas karcinomon en la cerbo, kiu malbone efikis sur la centroj, kiuj regulas la parolkapablon kaj la movadon de brakoj kaj kruroj".

Dume, la hejmo de Buonsanto iĝis magneto, kiu allogas la kredantojn, malsanulojn, malfortulojn, dum Liberato Buonsanto klarigas la okazintaĵon per simpla esprimo: "Ĝi estis miraklo".

- II -

La eta Dawn Smullen suferis solecan, doloran vivon en rad-seĝo, kripligita ekde la naskiĝo pro nask-

difekto, kiun la kuracistoj ne povis korekti.

Hodiaŭ, la aminda 3-jarulino saltas, kuras kaj ludas kun siaj kunludantoj. Ĉiu signo de ŝia nask-difekto mirakle estis malaperinta post ŝia vizito al la fama sanktejo de Lurdo en Francio.

D-ro Patrik Liston, kiu kuracis Dawn ekde ŝia naskiĝo, ne povis kredi. "Ŝi naskiĝis kun elartikigita kokso, kaj la artikaj ostoj ne kreskadis regule. Ĉio, kion ni provis, malsukcesis, eĉ ĥirurgio".

"Mi ekzamenis ŝin unu semajnon antaŭ ŝia ekiro al Lurdo, kaj ŝia kondiĉo estis tre grava. Mi vidis ŝin 3 tagojn post ŝia reveno, kaj la radiografaĵoj montris la kokson en perfektaj kondiĉoj. El medicina vidpunkto mi ne povas ekspliki tion. Ŝi devus ankoraŭ resti invalida (kripla)."

Dum la unuaj 3 jaroj de sia vivo, Dawn ne povis fari paŝon. "Ŝi klopodis kiel eble plej bone por tio, sed la doloro estis troa" diris s-ino Smullen. "Si faladis, aŭ ĵetis sin teren pro laceco. Ŝi nur povis iri pere de rad-seĝo".

Aŭguste 27an 1974 s-ino Smullen (kiu iris al Lurdo kun ĉirkaŭ 50 aliaj vilaĝanoj) metis Dawn en la Lurdan akvon, kie ŝi restis dum nur unu minuto.

Duonhoron poste, jam remetita en sian rad-seĝon, Dawn faris demandon, kiu ege mirigis ŝian patrinon: "Panjo, ĉu vi permesas min piediri? Miaj kruroj agas kvazaŭ ili volus iomete marŝi". Larmoj komencis toreti laŭ la vizaĝo de s-ino Smullen dum ŝi rakontis, memorigante tiujn karajn minutojn:

"Mi iĝis senvoĉa. Mi tenis mian spiron. Jen la decida momento ... ĉu ŝi vere iros, aŭ ĉu ŝi falegos pro l' doloro kiel ĉiam antaŭe? Mi ne kuraĝis rigardi. Malrapide Dawn stariĝis kaj faris kelkajn mallongajn paŝojn. La larmeco malaperis! Mia filineto povis ja iri!

Ni promenis kune dum ĉirkaŭ 10 minutoj, kaj tiam

Dawn diris, ke ŝi deziras marŝi kun la aliaj en la tra dicia Lurda procesio, kiu longas proksimume 1 mejlon (1,6 kilometron). "Ŝi laŭiris ĝin, ĉiujn centimetrojn, sen signo de lamado."

La patro de Dawn, Donald Smullen, kiu restis hejme, rakontis ŝian revenon: "Aŭtobuso alvenis, kaj la pordo malfermiĝis. Mi vidis Dawn elbusiĝanta per si mem. Ŝi rigardis antaŭen, kaj ekvidinte min, ŝi kuris al miaj brakoj. Ŝi fakte kuris! Jen mi estis vidanta mi raklon: mia filineto kuranta al mi. Mi ne hontas agnoski tion: la unuan fojon, kiam mi vidis ŝin marŝi, mi ploris pro la ĝojo".

(La rakonto estis ilustrita ankaŭ per foto, kiu montras la etan Dawn tre ĝoje kaj vigle ŝnursaltanta. Bedaŭrinde la foto ne estis sufiĉe taŭga por nia represa do. Noto de la redaktoro).

- III -

Hispana virino mortanta pro grava tuberkulozo, su bite resaniĝis, post kiam ŝi vidis vizion de Jesuo.

"Estas miraklo!" ĝojkrias Margareta Ortega Dominguez. "Dum 15 jaroj mi preskaŭ ne povis spiri aŭ iri. Nun mi estas denove sana, kaj la kuracistoj ne povas trovi cikatro-histojn en miaj pulmoj, dank'al Dio". La evidenta tuteca resaniĝo de Margareta konfuzas la plej elstarajn hispanajn ekspertojn pri medicino, kiuj konfirmas, ke la terura malsano de la kredema kaj timema kamparanino neklarigeble malaperis sen postlaso de signeto. "Ŝi tute resaniĝis de la tuberkulozaj simptomoj, kiujn ŝi suferis dum tiom da jaroj: lezoj de la pulmoj, eltuso de sango, kaj febro" diris pulm- kaj kor-specialisto, D-ro José Luis Hermoso Lòpez, doĵeno de la Lernejo de Medicino de la Universitato de Granado, kiu kuracis Margaretan dum 14 jaroj. "La

lastan fojon kiam mi vidis ŝin, ŝi estis tre malsana. Mi estis preskaŭ certa, ke ŝi estas mortanta". D-ro Juan Heras Guzmán, kuracisto de la familio de Margareta, diris: "Absolute ne ekzistas medicina ekspliko por ĉi tio. Naŭdek procentoj de unu el ŝiaj pulmoj estis detruita, kaj la alia estis jam difektita. Espero de resaniĝo ne plu estis ebla, sed nun radiografaĵoj montras, ke ŝi estas tute sana kaj normala".

Margareta memorigas: "Mi pasigis la plej multon de la tempo en lito, preĝante al Dio kaj petante lian helpon. Unu nokton, februare de 1972, granda lumo plenis la ĉambron, kaj la Sinjoro Jesuo aperis antaŭ mi. Mi alparolis al Li, kaj Li aspektis kvazaŭ el karno kaj sango. Li faris la signon de la kruco super mia brusto, dirante: "Mi estas faronta miraklon en ĉi tiu domo". Mi sentis kvazaŭ ŝarĝo de elektro kuradas tra mi. Mi tremis pro emocio. Estis tiom da lumo ĉirkaŭ la Sinjoro, ke miaj okuloj damaĝis rigardante Lin. La lumo bruligis mian cerbon. Li parolis denove al mi, kaj mi sentis malvarmeton tra la korpo, kiel tiu de malvarma bano, kaj la elektro forfluis el mia korpo. Mi sentiĝis paca kaj sen doloroj. La Sinjoro diris: "Filino, vi estas resanigita" kaj malaperis malrapide, ĝis restis nur malumo, kie Li estis aperinta. Dek tagojn poste mi iris al la kuracistoj, kaj ili tute ne sukcesis trovi ion malbonan en mi. Ili diris al mi, ke mi estas resanigita kaj ke mi havas la pulmojn de infano".

D-ro Ylija Pajovic, eksperta pulm-specialisto de la Hospitalo de Tuberkulozo de Florido, surpriziĝis ekscite pri tiu miriga kazo, kaj diris: "Mi neniam estis vidinta kazon, en kiu iu ajn, suferinte pro tuberkulozo 15 jarojn, resaniĝis, des malpli sen postlaso de cikatroj".

Hodiaŭ, kiam ŝi devus esti mortinta de longe laŭ la kuracistoj, Margareta pasigas la plej-parton de la tempo preĝante kaj laborante en la kampo de sia vilaĝo, su

de de Granado, kaj asertas, ke ŝi ankoraŭ havas viziojn de Kristo.

ARGENTINO . - LUJANO - 700.000 katolikoj pilgrimis al la nacia sanktejo de Nia Sinjorino de Lujano dum la ĵus pasinta jaro, laŭ informoj de la gvidantoj de la maria sanktejo. Unu el la plej multenombraj pilgrimadoj okazis en decembro, kiam 50.000 fideluloj, grandparte el Buenos-Ajreso, piediris ĉirkaŭ 70 kilometrojn, preĝante por la unueco de la familio. La registroj de la sanktejo dokumentas pli ol 180.000 epizodojn de fideluloj, kiuj atribuas al la perado de la Virgulino ĉiaspecajn gracojn, inter kiuj multajn resaniĝojn. En malgranda muzeo estas gardataj pli ol 15.000 votoferoj. La origino de la sanktejo de N. S. de Lujano datiĝas de la 16a jarcento.

BRAZILO . - RIO-DE-JANEIRO - La ĉefdiocezo de la brazila ĉefurbo celebras ĉijare la trian jarcenton de sia fondiĝo. Granda tutpopolapredikado, kiu daŭros la tutan jaron, okazos en ĉiuj diocezoj parokoj. La spirita mobilizado havos tri ĉefajn momentojn: la Karesmon, la semajnon, kiu antaŭ Pentekoston kaj tiun, kiu antaŭ la feston de Kristo-Reĝo.

HUNGARUJO . - ESZTERGOM - Mons. Laszlo Lekai, kiu je la 12a de februaro estis elektita de Paŭlo 6a Ĉefepiskopo de Esztergom kaj Primaso de Hungarujo, ricevis sian oficialan investon la 24an de la sama monato. En la solena ceremonio estis invitita de li ankaŭ la Ĉefepiskopo de Vieno, kard. Koenig.

ITALUJO . - ROMO - "La teologia formado de la estontaj sacerdotoj" estas la titolo de 50-paĝa dokumento transdonita de la S. Roma Kongregacio por la Katolika Edukiĝo al Episkopoj kaj rektoroj de porpastraj seminarioj.

Ĉi tiu teksto, prezentita en la itala lingvo - baza teksto -, estas eldonita ankaŭ en la hispana kaj portugala lingvoj. Sekvos tradukoj en la angla kaj en la germana. La dokumento devas esti konsiderata kompletiga de la alia, proponita per la sama S. Kongregacio je la 20a de januaro 1972 sub la titolo: "Instruado de Filozofio ĉe la Superaj Seminarioj". La aktuala dokumento, pli grava kaj vasta rilate la gravecon de la temaro, fariĝis necesa kaŭze de la demandoj prezentitaj de multaj Episkopoj.

La unua impresio povas esti, ke ĉi tiu dokumento estas sugestita de timo pro devojiĝoj. Ke ili ekzistas en la teologia kampo, kiu povus pridubi? Sed la motivoj estas tute aliaj.

Unue la konsiderinda evoluo, kiu okazis en la mondo de la penso. Evoluo, kiu preskaŭ atingis la agadkampon de la teologio. Fakte, aperis veraj novaj sciencoj, allogaj, aŭtoritate devigantaj ekde sia naskiĝo, kies objekto montras senperajn rilatojn kun la teologio: la esprimo "homaj sciencoj" fariĝis familiara kaj estas signifoplena.

Nu, ĉar temas pri homo kaj ekzistas nur unu vero, la teologio povas atendi de ĉi tiuj sciencoj nur gajnon, laŭ mezuro de la certecoj de ili atingitaj. Kaj ĉar "ĉiu malfacilaĵo estas lumo", ankaŭ la ŝajnaj konfliktoj povas esti akcepteblaj de la teologio kiel valora stimulilo.

Sed kiel ne antaŭvidi, ke ĉi tiu renkontiĝo, antaŭ ol esti fruktodona kaj utila, postulas ekstreman singardon por eviti ĉiuspecajn konfuzojn? Ekzistas danĝero, ke la metodoj de la homaj sciencoj, ĉar ili estas pli facilaj, kaŝe anstataŭigas la originan metodon, kiu apartenas al la teologio. Por ke ĝi ĉerpu helpojn de la homaj sciencoj, la teologio devas antaŭ ĉio esti "si mem". Ĉi tiu konsidero, hodiaŭ unuaranga, sufiĉe klarigas kial montriĝis necesa dokumento pri teologio, kaj kun kia spiri

to ĝi devas esti formulita laŭ la linio de la Konstitucio "Gaudium et Spes".

Fakte, la unua zorgo de ĉi tiu dokumento estas agnoski kuraĝe la nunan situacion laŭ ĝiaj malsamaj aspektoj, por kapabli precizigi la novajn orientiĝojn.

Neniam kiel nuntempe la kristana popolo tiom postulis de sacerdotoj, sed ankaŭ neniam kiel nun ilia respondeco kaj iliaj problemoj estis pli seriozaj.

La teologio devas, do, trovi esprimon taŭgan por la novaj kulturaj realoj. Demandoj alvenas al ĝi el ĉiu flanko: ekumenaj klopodoj, sociaj realoj, homaj sciencoj, novtipa teologia plurismo...

Kaj tamen, malgraŭ ĉi tio, aŭ pli vere, ĝuste pro ĉi tio, necesas lumigi plej klare la postulojn de la teologia instruado. Ĉi tiu estas la temo de la dua parto, la plej grava, de la dokumento. Por esti sufiĉe vigla kaj kreiva, la teologio devas esti entute si mem kaj rekonfirmi sian naturon de "scienco pri kredo", organo de la Eklezio, kiu ne povas malhavi spiritan personan dimension. El ĉi tio devenas la daŭra funkciado de la teologio je la servo de la revelacio, de la spirita vivo, de paŝtista laboro, de la kreskigo de la Krista korpo, de la misioj, de ekumenismo, de la homaj valoroj kaj de la socia progreso.

La teksto klarigas vaste la duoblan taskon de la teologia scienco: esplorado de la fontoj kaj asimilado de la kredo. Duobla tasko respondanta al unika realo, kiu kunigas per la pozitiva teologio la historian dimension, kaj per la spekulativa la laŭsisteman. La dokumento indikas la kondiĉojn de teologia laboro respondantajnal la teologia naturo: rilatoj kun la instruaŭtoritato, fideleco al la kristana teologia kaj filozofia fundamento; rilatoj kun filozofio, homaj sciencoj kaj teraj realoj.

Sekvas konkretaj orientiĝoj pri instruado: unue la

ĝenerala orientiĝo, poste tiu, kiu koncernas kelkajn a partajn teologiajn sektorojn, pri kiuj ŝajnas oportunaj kelkaj atentigoj.

La dokumento konkludiĝas per malmultaj gravaj kaj decidaj paĝoj, kiuj reliefigas la devojn unue de respondeculoj, poste de studentoj; kaj fine ĝi donas konsilojn pri organizado de teologiaj studoj.

PROF. ZWI WERBLOWSKY, rajtigito por la katedro pri historio de la Religioj ĉe la Hebrea Universitato de Jerusalemo kaj prezidanto de la Interkonfesia Israela Komitato, prelegis ĉe la Porunuiga Centro en Romo.

La profesoro substrekis la tute apartan karakteron de Jerusalemo, kiu ne estas sankta urbo por unu nura religio kiel aliaj urboj en la mondo (ekz. Mekko por Islamo kaj Banaraso por hinduismo), sed estas tia por la tri monoteismaj religioj, kiuj havas komunan bazon.

Ĉi tiu realo ne estigas necese pli grandan kompremon kaj unuecon, eĉ, kontraŭe ĝi povas kaŭzi rivalecojn kaj koliziojn pro malsamaj interesoj.

Estas grave unue kompreni la karakteron el la religia vidpunkto, de ĉi tiu koncepto pri sankteco kaj kiel ĝi diversmaniere agadas ĉe malsamaj religioj.

La preleganto analizis poste ĉi tiun starpunkton laŭ la islama tradicio, kaj deduktis, ke Islamo heredis tiun ligilon kun Jerusalemo de la hebrea kaj kristana religioj, kiuj multe influis la islaman tradicion. Ĉi tiu influo estis tiel forta, ke ĝi estigis legendon (sed por muzulmano temas pri dogmo), ke la profeto Mahometo estis mirakle translokita de Mekko al Jerusalemo kaj de Jerusalemo levita al la ĉielo.

Post la okupacio de Jerusalemo fare de muzulmanoj, la urbo fariĝis islama religia centro, ankaŭ por neŭtraliigi parte la precizan kristanan karakteron, kiun ĉi tiu urbo akiris dum la plurjarcenta bizanca regado.

Malgraŭ ĉi tio oni devas reliefigi, ke la religia islamisma graveco de Jerusalemo estas malpli granda ol tiu de Mekko kaj Medino, kaj ke neniam ĝi fariĝis centro de la nacia historia konscienco.

Dum ĉiuj jarcentoj de muzulmana regado, neniam Jerusalemo estis ĉefurbo de ŝtato aŭ eĉ de provinco.

La kristanismo heredis de hebreismo la simbolan signifon de Jerusalemo, kiel ĝi estas esprimita en la Psalmoj, kaj al tio aldoniĝis la historiaj memoraĵoj pri la vivo kaj morto de Jesuo, kunligitaj kun difinitaj lokoj de la Sankta Lando kaj de la Sankta Urbo.

Tamen estas rimarkinda en la Nova Testamento la universaleco kaj la ne-teritorieco de la koncepto pri ĉi tiu sankteco.

La Eklezio superas la historian nacion kaj la ĉiela Jerusalemo fariĝis la centra simbolo kaj pli-grava ol la surtera, kiu nun estas memorigilo de la Sankta-Skribaj eventoj.

Laŭ la oratoro ne ekzistas pro tio opozicio de interesoj inter la aspiroj historiaj-naciaj de la hebrea popolo pri Jerusalemo kaj la spirita kaj religia koncepto pri la sankta urbo.

Por hebreismo la signifo de Jerusalemo estas tute alia.

La urbo estas simbolo ne nur pri la religia kaj spirita dimensio, sed ankaŭ pri la nacia identeco de ĝia historia konkreta karaktero.

Ĉi tiu koncepto havas sian devenon el la libro de la Psalmoj kaj de la Profetoj, kaj ĝia lasta manifestado estas la movado por la nacia liberigo de la hebrea popolo, konata sub la nomo Cionismo.

Ciono kaj Jerusalemo estas sinonimoj kaj la libera movado ne trovis nomon pli taŭgan ol Ciono por esprimi la historian, religian kaj kulturan sencon de la hebrea konscienco.

La oratoro konkludis dirante, ke la strikta ligilo de la tri religioj kun la Sankta Urbo povus kompreneble esti eĉ konfliktoj, ĉefe pro la fakto, ke ĉe la islama tradicio la spiritaj, politikaj kaj laikaj aferoj interkruciĝas, ne kiel ĉe la kristana tradicio, kiu disigas ĉi tiujn du konceptojn.

Oni devas esperi, ke la malsama karaktero de la rilatoj inter urbo kaj ĝia sankteco estigos ankaŭ eblecon de interkonsentoj kaj de solvoj bazitaj sur interkompreno kaj reciproka respekto.

DEK KANZONOJ laŭ religia inspiro, kiuj dum la Sankta Jaro 1975 atingis la plej vastan konsenton, estis prezentitaj de Silvio Gigli en la aŭditorio "Antoniano" por esti premiitaj. Partoprenis en ĉi tiu arta vespero famaj kantistoj, akompanataj de la muzika ensemblo de Franco Riva, je ĉeesto de pli ol mil spektantoj kaj de la ĉefepiskopo de Sieno, kiu je la fino premiis la artistojn.

La spektaklo estis registrita por la itala radio, rubriko "Fratino Radio" por malsanuloj. La dek kanzonoj estas: "Mi preĝos" de Tolomei kaj Francky, kantita de Karla Sabina; "Vi estos libera kun Li" de Balido kaj Cavazzaro, kantita de Giorgio Onorato; "Kiel pezas la mondo", amerika "spiritualo" tradukita kaj adaptita de Varvarà kaj Ceragioli kaj kantita de Marta Lami; "Aŭskultu, mia Dio", novaĵo de Franco Marino, kiu la aŭtoro mem kantis sin akompanante per gitaro; "Negraj Anĝeloj" la amerika sukcesa kanto, kiun diskonigis la voĉo de la negra kantisto Marino Barreto kaj kiu, dum la Jubileo estis kantita de la ĉilia, meksika kaj brazila pilgrimantaro; "Vi estas la bildo" de Balido Deodati, bela romanca kanzono kantita de soprano Elisabetta Delicato; alia "spiritualo" negra, tradukita de Leone Piccioni kaj kantita de Nicola Ariglia

no; "Ĉielangulo" de Luisca kaj Armando del Cupola, kantita de Isa di Marzio; "Romo, vi estas entute sanktejo", de Patriarca, unu el la kanzonoj lanĉitaj de la itala Radio ĝuste okaze de la Sankta Jaro, kantita de Giorgio Onorato; fine "Shalom" de Tolomei-Bonfitto, la peco plej populara en 1975 en la religia mondo, kantita de Marta Lami.

KANADO. - OTAVO.

La 41a Internacia Eŭkaristia Kongreso de Filadelfio en Usono (1-8 aŭg. 1976) estos post la Sankta Jaro unu el la plej gravaj religiaj eventoj en la mondo. Paŭlo 6a dum aŭdienco donita al la kunlaborantoj por ĉi tiu granda projekto, donis al ili ĝian temon: "Eŭkaristio kaj malsato de la homa familio", kaj la devizon: "Jesuo, pano de la vivo".

Jam kelkcentoj da personoj eklaboras, por ke ĉi tiu granda kunveno de kristanoj el la tuta mondo atingula deziratan sukceson kaj veku en la amerika kontinento renovigon de kredo centrita en la Eŭkaristio. Simbolo de la Eŭkaristia Kongreso estos du stiligitaj manoj, kiuj tenas hostion, reprezentantan la Korpon de Kristo, kiun la kristano ricevas per la Komunio.

En ĉi tiu epoko, en kiu ŝajnas triumfi la malobeco al la diaj leĝoj, kaj la amaso vivas nur por la ĝuoj, kiujn la mondo materialisma promesas, estas ĝuste kaj necese proklami alte nian fidelecon al Dio. Nenio, ki el iu Eŭkaristia Internacia Kongreso, povas pli sole-
ne esprimi ĉi tion. Pro tio la Eklezio donas ĉiujn siajn zorgojn por tiuj esceptaj celebroy. Ĉi tiu Kongreso, kiu estos la dua en Ameriko, ĝuos pri la spertoj de ĉiuj antaŭaj, sed ĝi estos malsama, kompare kun ili kaj respegulos la spiritajn kaj materiajn problemojn de la nuntempa homaro. De la plej alta eklezia aŭtoritato ĝis la plej humilaj indiĝenoj, (300 triboj de ame-

rikaj ~~indianoj~~ sin preparas por omaĝi la dian Eŭkaristi-
on laŭ sia indiĝena liturgia tradicio) ĉiuj jam klopodas
por esprimi al Dio aman fidelecon, riparon pro la ofen-
doj, dankon pro la ricevitaj gracoj. Aparta preĝo es-
tis proponita tiucele. Jen ĝia teksto:

"Ho ĉiela Patro, por vi ni estis kreitaj, kaj niaj ko-
roj for de vi ne ĝuas pacon. Respondu al nia arda so-
piro, pere de Jesuo, Pano de vivo, por ke ni kapablu
atesti pri li, la unika, ni tion scias, kiu povas satigi
la homaron. Ebligu, ke la povo de via Spirito gvidu nin
al la ĉielo, por ke ni partoprenu en la dia festeno kon-
templante eterne vian gloron. Amen".

Jen la kronologio de la Internaciaj Eŭkaristiaj Kon-
gresoj: 1) Lille, Francujo, 1881; 2) Avinjono, Fran-
cujo, 1882; 3) Lieĝo, Belgujo, 1883, 4) Friburgo, Ger-
manujo, 1885; 5) Tuluzo, Francujo, 1886; 6) Parizo,
Francujo, 1888; 7) Antverpeno, Belgujo, 1890; 8) Je-
rusalemo, Izraelo, 1893; 9) Reims, Francujo, 1894;
10) Paray-le-Monial, Francujo, 1897; 11) Bruselo, Bel-
gujo, 1898; 12) Lurdo, Francujo, 1899; 13) Angers ,
Francujo, 1901; 14) Namur, Belgujo, 1902; 15) Angou-
lême, Francujo, 1904; 16) Romo, Italujo, 1905; 17)
Tournai, Belgujo, 1906; 18) Metz, Francujo, 1907; 19)
Londono, Britujo, 1908; 20) Kolonjo, Germanujo, 1909;
21) Montreal, Kanado, 1910; 22) Madrido, Hispanujo;
1911; 23) Vieno, Aŭstrujo, 1912; La Valetto, Malto, 1913;
25) Lurdo, Francujo, 1914; 26) Romo, Italujo, 1922 ;
27) Amsterdamo, Nederlando, 1924; 28) Ĉikago, Uŝo-
no, 1926; 29) Sidnejo, Aŭstralio, 1928; 30) Kartageno,
Afriko, 1930; 31) Dublino, Irlando, 1932; 32) Buenos-
-Ajreso; Argentino, 1932; 33) Manilo, Filipinoj, 1937;
34) Budapeŝto, Hungarujo, 1938; 35) Barcelono, His-
panujo, 1952; 36) Rio-de-Janeiro, Brazilo, 1955; 37)
Munkeno, Germanujo, 1960; 38) Bombajo, Hindujo, 1964;
39) Bogoto, Kolombio, 1968; 40) Melburno, Aŭstralio;

1973; 41) Filadelfio, Usono, 1976.

MONTREALO. - La sekretariato de la kanada episkopa konferenco en freŝdata noto diskonigis la atingitan agnoskon pri valideco de la bapto inter la 5 plej gravaj kristanaj Eklezioj de la lando: anglikana, katolika, luterana, presbiteriana kaj kunigita. Ekde nun ili donos komunan baptateston. La sama noto tiel komentas la informon: "Ĉi tiuj progresoj estas frukto de kunlaboro inter reprezentantoj de la kanada Konsilio de la Eklezioj kaj de la Kanada Episkopa Konferenco. Ekde nun ĉiu bapto donita en kristana preĝejo per fluanta akvo aŭ per aspergado, per mergado aŭ surverŝado, kaj per la triunua formulo (mi baptas vin en la nomo de la Patro kaj de l' Filo kaj de la Sankta Spirito) estos agnoskita de la aliaj menciitaj Eklezioj. La komuna signifo rekonita de ĉiu Eklezio estos simbolo de la ligilo, kiu kunigas ĉiujn sekvantojn de Kristo.

Por la Katolika Eklezio ĉi tiu atingo signifas grandan paŝon renkonte al la aplikado de la decidoj faritaj en la Dua Vatikana Koncilio kaj renverson de la agnosko pri probabla nevalideco de la baptoj liveritaj ĉe la aliaj kristanaj konfesioj. Ĉi tiu laŭsistema dubo pri tiu materio estas kontraŭa al la spirito de la Dua Vatikana.

Teologoj kaj eklezia leĝaro kunkonsentis, ke la bapto devas esti nur unufoje donita; sed praktike, la valideco de la baptoj liveritaj de la aliaj eklezioj tro ofte estigis dubojn. Ĝis antaŭ malmultaj jaroj laŭkondiĉa bapto estis regula por kristanoj, kiuj konvertiĝis al la Katolika Eklezio. Sed nun, escepte de okazo de preciza kontraŭa pruvo, iu Eklezio akceptos ĉiun bapton donitan de la aliaj supre diritaj Eklezioj.

Pri tiu nova decido de la Eklezioj profitos la kristanoj, kiuj konvertiĝos al katolikismo kaj tiuj, kiuj ha-

vus neceson de liberigo por miksedziĝo ĉar unu estas katolika kaj la alia baptita en alia kristana Eklezio.

La interkonsento de kristanaj Eklezioj en Kanado sin inspiras al Konciliaj dokumentoj pri Ekleziokaj ekumenismo kaj aparte al la porekumenisma direktivo - ro publikigita en 1967 de la sekretariato por la unue - co de la kristanoj (n-oj 10, 11, 16, 17, 18). Ĉi tiu interkonsento sekvas similajn deklarojn de la kristanaj Eklezioj en Madagaskaro (1969), en Zambio (1970), en Belgujo (1971), en Francujo (1972). Analogaj paŝoj estas farataj en Britujo kaj Kimrujo. Komitato proponas al la Kanadaj Eklezioj la komunajn atestformulojn pri baptito, krom la kurantaj.

TUTPOLLANDA PREĜTAGO DE ESPERANTISTOJ

sur Hela Monto en Ĉenstoĥovo

Ĉenstoĥovo estas jam ekde ses jarcentoj la spirita centro de la pola katolikaro. Ĉiujare pilgrimas tien multaj kredantoj, por preĝi antaŭ la mirakla bildo de Dipatrino Maria (Nigra Madono). En ĉi tiun eklezian agadon eniras la pola esperantistaro organizante ĉiujare preĝtagon je la unua dimanĉo de junio. Ĉijare tio okazos la 5an de junio je la 17a h. ĝis la 6a de junio, 14a h.

Bonvenigitaj kaj invititaj estas ankaŭ eksterlandaj samideanoj.

P. R. Forycki
Animzorganto de polaj esperantistoj